Martinus Institut

N-ro 1 - 2019

# Kosmos


## La Kosmologio de Martinus

**Simbolklarigo:**
La eterna mondplano

**Martinus:**
Pereo de mondkulturo

**Ole Therkelsen:**
Martinus kaj Kriŝnamurti – parto 3

**Martinus kaj lia verko**



© Martinus Institut 1981 Reg. 13

*La eterna mondplano*

Esperanto

# La eterna mondplano – Simbolo n-ro 13

## Klarigo de la frontpaĝa simbolo (resumo)

La simbolo montras kiel ĉiuj estuloj trairas evoluon tra ses diversaj vivsferoj, kiuj kune konsistigas spiralciklon. La unuaj tri vivsferoj de la spiralciklo estas el pli fizika naturo ol la tri lastaj. Spiralciklo ampleksas enormajn tempodaŭrojn. Ni homoj estas jam travivintaj la plantoregnon, kaj nun troviĝas fine de la bestoregno survoje al la vera homregno. Ni vivas meze de konflikto inter la sinkonserva instinkto de la bestoregno kaj nia kreskanta humana talento. La influo de la vivspertado, vivon post vivo, kaŭzas nian laŭgradan evoluon al "la fina homo laŭ la bildo de Dio". La fina homo estas geniulo pri logika kaj ama manifestado de sia kreokapablo en harmonio kun siaj proksimuloj. Jen la provizora celo de la homaro, por kies alveno ni ĉiuj unuope povas konscie labori.

Post tio, la evoluo daŭrigas al eĉ pli altaj vivsferoj. Kiam unu spiralciklo estas travivita, la travivado de nova spiralciklo komenciĝas, sed nun en novaj variaĵoj. La interagado inter lumo kaj mallumo en la vivo kreas la kontrastojn necesajn por garantii, ke nia vivtravivado restu eterna. Sen la suferaj spertoj de la mallumo, la kapablo kompati ne povus evolui, same kiel la kompreno pri la naturo de la amo. La bestoregno estas la sola loko, kie ni perceptas la mallumon kiel suferon kaj doloron. En la ceteraj kvin regnoj, la mallumo ĉeestas nur kiel scio pri la sufero, kunportita kiel memoroj el la bestoregno. Tial, la mallumo, en sia plej profunda analizo, estas aspekto de la kosma amo.


Gravaj elementoj de la simbolo:

- La blanka triangulo montras la mion de la universo aŭ Dio. La blankaj cirkloj simbolas, ĉiu unuope, mion de viva estulo. La ses sekcioj, en kiujn la simbolo estas dividita, reprezentas la ses vivsferojn de la spiralciklo.
- La plej malsupra sekcio montras la plantoregnon (per ruĝo), sekvata en direkto dekstren, de la bestoregno (oranĝkoloro), la vera homregno (flavo), la saĝoregno (verdo), la dia mondo (bluo), kaj la beatoregno (hele indiga koloro).
- La ringformaj koloraj kampoj simbolas la regionojn ene de kiuj la bazenergioj manifestiĝas en la formo de vivsfera "materio".
- La ses nigraj rombformaj figuroj simbolas, ĉiu unuope, la bazenergian kombinon en la tuteca korpo de la viva estulo, kiu konsistigas ties konscion.
- La unuopaj tutecorganismoj havas ĉiuj sian kombinon de la ses bazenergiaj korpoj: la instinktokorpo (ruĝo), la pezokorpo (oranĝkoloro), la sentokorpo (flavo), la inteligentokorpo (verdo), la intuicikorpo (bluo), kaj la memorkorpo (hele indiga koloro).
- La punktaj linioj kiuj iras de korpo al korpo, montras kiel la kapacito de la bazenergiaj korpoj ŝanĝiĝas de unu vivsfero al alia.
- La nigra kaj blanka ringformaj kampoj rande de la simbolo, montras la interagon inter la mallumo kaj la lumo tra la ses vivsferoj.

Legu la plenan simbolklarigon de Martinus en La Eterna Mondbildo, vol. 1.

# Pereo de mondkulturo

de Martinus


M2540

**1. Iam la grandaj mondreligioj regis la mondon**

Ni vivas en tre maltrankvila tempo. Dum jarmiloj la grandaj mondreligioj formis la firmajn bazon kaj idealon por la moralo kaj konduto de la homoj. Sed nun ili ne plu ludas la saman rolon en nia kulturkreado kiel ili faris antaŭe. Preĝejoj kaj temploj, kaj eble plej multe aŭtoritata pastraro gvidanta la ceremoniajn kaj sakramentajn agojn, sugestiis la homaron por kredi je ekzistanta providenco, kaj je moralo kaj konduto kiujn preskribis tiuj religiaj institucioj kiel esprimon pri la plej alta etiko kaj homa perfekteco.

La portanta faktoro en tiu kulturkreado sekve fariĝis la kredo je ekzistanta providenco, kaj je tio ke malantaŭ ĉiuj ekzistantaj vivtravivaĵoj troviĝas diaj plano, senco aŭ intenco. La homoj por kiuj tiu predikado estis destinita plej altgrade havis religian instinkton kiu simple kondiĉis, ke ili trovis la penson pri la ekzisto de dia providenco natura aŭ memkomprenebla, kaj tial la pastraro ne renkontis grandan kontraŭstaron. La grandaj mondreligioj reale regis la mondon. Sed la religia instinkto aŭ la interna funkcio malantaŭ la kapablo aŭ tendenco de la kredanta homo fidi la ekziston de providenco, ne estas homa eltrovaĵo. Ĝi estas kunnaskita animorgana funkcio, kiun ni renkontas jam en la bestoregno, kie la mortotimkrio de la besto efektive estas la unua, senkonscia sinturno pri helpo de iu por ĝi absolute nekonata providenco. Por kio alia okazas tiu mortotimkrio, kiu realiĝas nur kiam ĉiuj naturaj helpiloj de la besto estas eluzitaj? Neniu, ankaŭ ne la besto mem, atendas ke ĝia persekutanto kaptiĝas de kompato kaj domaĝas ĝin. La rabobesto ne konas kompaton, kiu efektive estus ĝia propra sinmortigo.

**2. Por la naturhomo providenco estas memkompreneblaĵo**

Ankaŭ ĉe ĉiuj naturhomoj ni renkontas tiun instinkton, tiun senseton pri la ekzisto de providenco. Ja en tiu regiono tiu sento estas tiel evoluinta, ke en tiuj vivstadioj ni eĉ ne trovas unu solan "malkredanton". La providenco aŭ la spirita mondo estas memkompreneblaĵo por ĉiu naturhomo. Tiu kapablo, tiu religia instinkto sekve troviĝas en ĉiu estulo precize sammaniere kiel la kapablo fariĝi planto troviĝas en ĉiu semero, kaj same kiel la kapablo fariĝi besto el tiu aŭ alia specio aŭ raso estas enigita en la semero de ĉiu besto. Por la evoluinta homo do estas neskuebla fakto, ke la kapablo kredi je ekzistanta, spirita providenco ne estas eltrovita de iu homo, sed male estas io psika-organa ĉe la viva estulo. Sed la imago de la tera homo pri tiu providenco ĉiam estas produkto de ĝia fantazio aŭ imagokapablo. Kutime ĝi ĉiam imagas tiun providencon "laŭ sia propra bildo", sed laŭ multe pli perfekta stato ol tiu, en kiu ĝi mem troviĝas.

**3. La homo inklinis imagi la providencon laŭ sia propra bildo**

Ĝuste pro sia inklino bildigi providencon aŭ dion laŭ sia propra bildo la di-

versaj popoloj ĉiu unuope havis dum la tempoj sian specialan imagon por adori aŭ kulti. Sed komuna por ili ĉiuj estis ilia kunnaskita kapablo aŭ tendenco kredi, ke necese ekzistas providenco, unu aŭ eble pluraj dioj. Tiu instinkto aŭ tiu tendenco estis tiamaniere direktata aŭ gvidata de profetoj, pastroj ktp., ke ankoraŭ nuntempe sennombraj milionoj da homoj estas ligitaj de tio kaj sekve havas la imagon pri ekzisto de dia providenco.

**4. La vivsinteno ŝanĝiĝis de abstrakta al konkreta enhavo**

Se ni observas la nuntempan homon ni vidas, ke kaj en la batalo por la ĉiutaga pano kaj sur multaj aliaj kampoj ĝi troviĝas en situacio, kiu donas al ĝi sennombrajn spertojn kun kiuj ĝi antaŭe ne havis kontakton. La moderna, teknika socio influas la homon multe pli intence ol faris la sociformoj de la pasinteco, kiuj sekvis tute alian vivritmon ol tiun, kiu nuntempe karakterizas la vivon de la meznivela homo. La rezulto de tio fariĝis, ke malrapide la moderna homo komencas forkreski de la kapablo vivi surbaze de abstraktaĵoj. Ĝia progresigita vivritmo donas al ĝi sennombrajn, novajn spertojn, kio neeviteble sekvigas ke la vivsinteno ŝanĝiĝas de abstrakta al konkreta bazo. La daŭra spertoevoluo kaŭzas ke la inteligentokapablo de la tera homo nun evoluas tre forte. Tio sekvigas, ke nesciante tion ĝi ofte venis en staton, kie laŭgrade ĝi liberigas sin de tiuj ligiloj, kiuj ĝis nia tempo tenis ĝin je imagoj kiujn nuntempe ĝia inteligento malkaŝas kiel nerealaj, ja kiel konfliktaj kun tiu logiko kiun la vivo malkaŝas sur ĉiuj kampoj. La inteligentokapablo do pli kaj pli anstataŭigas tiun instinkton kiu antaŭe realigis ĝian senstravivadon. La provizora rezulto de tiu proceso estas ĉe la unuopa homo ĝia kreskanta materiismo, ĝia kreskanta postulo pri pli granda parto de la pure fizikaj vivbonaĵoj. La instinktofunkcio realigis la kapablon kontakti la psikajn aŭ abstraktajn regionojn de la vivo. Kaj nun ni vidas ke aliflanke la inteligento estas forto per kiu la homo en daŭre pli kaj pli alta grado kapablas malkaŝi konkretajn faktojn.

**5. la evoluo de la inteligentokapablo malaperas la kapablo blinde kredi**

La evoluo do sekvigas ke laŭgrade la tera homo perdis sian instinktan kontakton kun la psikaj regionoj de la vivo favore al plenklara, inteligenteca spertado de la fizika sfero, la tute fizika mondo. La rezulto de tio klare vidiĝas per tio, ke samtempe kun la kreskado de la inteligentokapablo reduktiĝas la kapablo blinde kredi. La moderna homo preferas bazi sian vivon sur spertoj konfirmitaj per inteligento, anstataŭ sur nebulecaj, instinktaj aŭ sensetaj perceptoj. Ĉar ĝia plej grava spertomaterialo tralumita de la inteligento estas ligita al la materia mondo, necese la materiismo unuavice venkis. Ne la homo, sed la vivo mem kondukis la homon en tiun kulminan materiismon kiu nuntempe regas la mondon.

**6. Materiismo progresigas sendiecon**

Nuntempe rigardi la mondon signifas vidi homaron, kies plimulto akceptas nur tion kion pure fizike oni povas pesi kaj mezuri. Nur la fizika substanco estas alirebla por fizika sensado, estas pesebla kaj mezurebla, kaj tial ni vidas ke sole ĝi estas objekto por la ĉefaj interesoj de la moderna homo. Je ĝi oni kredas. Oni ne vidas kaj sekve ne kredas je la viva Io kiu efektive ekzistas kiel la organizanto de la substanco, kiel tiu faktoro kiu transformas la substancon kaj faras ĝin uzebla kiel organismo por tiu Io, aŭ kiel objektoj por ĝia uzo. Tiu viva Io efektive identas kun la diulo,

kun la eterna faktoro malantaŭ la portempaj aferoj kaj tial plej esence identas kun Dio. Sekve pro sia mankanta intereso pri la reala ekzisto de tiu viva Io la moderna homo fariĝis sendia.

**7. En la materio la scienco vane serĉas la solvon de la vivmistero**

Nuntempe esti religia sekve estas la samo kiel esti naiva. Por intelekta homo estas honta afero kredi je aŭ inklini al konceptoj apartenaj al malaperinta pasinteco, al la "spirita infanĉambro" de la homo. Pro la kreskanta inteligentokapablo oni venis al la sinteno, ke la solvo de la vivmistero estas el pure materia naturo, estas trovebla en la mondo de la substanco. Necese ĝi estas io pesebla aŭ mezurebla, necese ĝi estas temp- kaj spacdimensia. Vane la scienco serĉis kaj daŭre serĉas tiun solvon povante doni nur tiun respondon, ke ĉio ŝajne baziĝas sur la nekontrolebla ludo de hazardoj. Ĉio ekster la mondo de la homo, kaj ĉi tie ankaŭ ĉiuj ceteraj, vivaj estuloj, kaj la universo kun ĝiaj sennombraj sunsistemoj kaj galaksioj, reale estas nur hazardaj, malvivaj fortoj. Nur hezite oni pensas ke aliaj planedoj ol tero estas loĝataj. Vesperon post vespero tiu senfina stelaro preterglitas niajn mirantajn okulojn, tiuj grandiozaj, kosmaj sistemoj sekvas jarmilojn post jarmiloj precize fiksitajn vojojn. Ĉiuj el ili estas nur la hazarda ludo de tiuj malvivaj fortoj, estas malvivaj materikombinoj sen ia ajn pli alta celo. Nur la tero, tiu polvero de la polveroj en makrokosma gigantomondo estas dotita per pli alta vivo, sole nur tie en tiu grandioza, tiu nesuperrigardebla kaj netravidebla universo troviĝas vivo, troviĝas pensantaj homoj!

**8. Pure materia esplorado ne donas ian ajn gvidlinion pri moralo aŭ konduto**

Sed ĉu tio ne estas la samo kiel kulti la morton? Se nia mondo estas la sola, loĝata planedo en la universo, kaj la vivo ĉi tie estas nur produkto de "heredo kaj medio", de "genoj" kaj "kromosomoj", kaj ĉiu parolo pri persona senmorteco estas hontiga sensencaĵo, tiam nia mondo ja necese estas la mortoregno mem, kaj nia planedo estas la plej stranga "kadavro" kiu iam ekzistis. La vivfilozofio tuŝita ĉi tie estas la ekstrema konsekvenco de pure materia aŭ temp- kaj spacdimensia esplorado. Tiu esplorado donas nur pure materiajn informojn, sed ne ian ajn gvidlinion pri moralo aŭ konduto. Por ĝi la vivo estas nur fizika proceso, kaj sur tiu kampo ĝi kulminas en tiu scio kiu nomiĝu genia, ĉar dank' al tiu scio la homo fariĝis mastro super la elementoj. Surbaze de tiu scio sennombraj milionoj da ĉevalpovoj nuntempe laboras por la homaro. Ĉie la homoj nuntempe premas butonojn, kaj sekve maŝinoj centmilope produktas utilobjektojn. Premante butonojn, turnante tenilojn ktp. ili ekhavas lumon kaj varmon en siaj loĝejoj, ili ŝipas sub la maro, sur la maro kaj rapidegas tra la aero. Envere sur certaj kampoj la homo fariĝis simila al Dio. Ekipita per potenco kiel neniam antaŭe la homo ordonas, kaj la substanco obeas al ĝia volo. Sed malantaŭ tiu potenco, malantaŭ tiu tuta dia povo ekzistas la malkredo, la sendieco. Meze en sia tuta, genia inteligenteca povo la tera homo fariĝis kosme senkonscia estulo!

**9. Nuntempe la homaro havas teorian eblon ekstermi sin mem**

Ĉi tie en la okcidento ni ĉiuj estas edukitaj en la kristana kredo, kaj ĉiuj aŭdis pri la du arboj en "La ĝardeno de Edeno", "La arbo de sciado" kaj "La arbo de la Vivo". Kaj ni ĉiuj lernis, ke "Tiun tagon, kiam vi manĝos la fruktojn de la arbo de sciado, vi mortos"! Tiu por multaj tiel enigma antaŭdiro kulmine plenumiĝis en nia tempo kaj en nia mondo. Ĉie kien ni turnas niajn

okulojn ni vidas, ke la plej altranga rezulto de la kontakto de la homo kun la inteligento fariĝas la kapablo ekstermi vivon tiel amplekse, ke eĉ ne la plej vigla fantazio kapablas imagi tion. Nuntempe la sinekstermo de la homaro per rimedoj kiujn ĝi mem produktis, estas almenaŭ teoria eblo. Sed vivdisvolvo kies celo estas morto kaj korpodifekto por sennombraj milionoj da homoj kaj bestoj, kies celo estas ekstermo de ĉia vivo en grandegaj landregionoj, ĉu ĝi estas esprimo de altintelekteco? Absolute ne! Ĝi estas esprimo nur pri tiu kosma morto kiun kaŭzus la ĝuado de la fruktoj de "La arbo de sciado". Tio ke homoj detruas homojn ja efektive signifas ke la homa raso detruas sin mem. Tia stato ne troviĝas ĉe aliaj vivoformoj sur la tero. Leonoj ne mortigas leonojn, kaj tigroj ne mortigas tigrojn. Kiam escepte okazas tia mortigo, ĝi estas nur rezulto de periodaj, seksardaj bataloj, kaj neniam tiuj mortigoj estas danĝeraj por la ekzisto de la raso aŭ specio. Sed la homoj ne mortigas nur per la nudaj manoj. Por ĝi ne necesas mortigi nur per sia propra, fizika organismo. Ne, ĝi konstruis maŝinojn kun tia mortigokapacito, ke per nura premo sur butono ĝi povas ekstermi milionojn de sia propra raso. Envere la homo fariĝis la perfekta mortiganto, la genia besto. Tial ne estas mirige, ke la efikoj de tiu stato estas mondo en timo, mondo kie nun "ĉies batalo kontraŭ ĉiuj" trafuriozas ĉiujn kontinentojn kaj marojn de la terglobo.

### 10. Nek la kristanismo nek aliaj mondreligioj povas malhelpi la pereon de la ekzistanta mondkulturo

Ke tiu situacio estiĝis, tion nek la kristanismo nek la aliaj modreligioj povis malhelpi, kaj same ili ankoraŭ malpli povas ĉesigi tiun staton. Tial la nuntempe ekzistanta mondkulturo daŭre reduktiĝas. Kaj daŭre milito kaj armado estas la aktualaj, mondaj problemoj, kiuj foruzas ĉiujn valoraĵojn kaj la tutan laborforton sen kiuj ne eblas konstrui novan kaj veran mondkulturon. La timo de novaj militoj nuntempe konservas "ĉies militon kontraŭ ĉiuj". Kaj konsekvencoj de tiu timo estas malriĉo kaj mizero, invalideco kaj mortostertoro, malmoraliĝo kaj epoko de kareco, aŭ ĉio kio krias al la ĉielo pri manko de kulturo, manko de tiuj spirito, arto kaj proksimula amo, kiuj ĉiam lumas tie kie reala, vera altintelekteco regas la animan vivon.

### 11. La mondreligioj donas koncentritajn vivrezultojn, sed ne inteligentecajn analizojn de la vivmistero

Kio estas kaŭzo ke nek la aziaj religioj kaj nek la kristana mondreligio kapablas savi aŭ liberigi la homaron el tiu ĉioampleksa "ĉies milito kontraŭ ĉiuj"? Efektive la kaŭzo estas tiu simpla, ke neniam tiuj religioj estis destinitaj aŭ adaptitaj por doni al la homo klarajn, inteligentecajn analizojn pri la vivmistero, sed ekskluzive nur serion de koncentritaj vivrezultoj kulminaj en la postulo pri proksimula amo aŭ tre alta grado de humaneco. La religioj ne estas kreitaj al homaro de universitate edukitaj estuloj, sed male al homaro kiu ankoraŭ posedis la kapablon kredi senkondiĉe. Tial ni vidas, ke daŭre la religio kapablas doni spiritan nutraĵon al ĉiuj tiuj homoj kiuj ankoraŭ kapablas vivi surbaze de nedifinita sentotravivado de la plej profundaj problemoj de la vivo. Ĝuste al tiuj homoj ĝi donas siajn vivrezultojn kun la vortoj: "Tio kion homo semas, tion ankaŭ li rikoltos" – "Amu vian proksimulon kiel vin mem" – "Remetu vian glavon en ĝian ingon, ĉar tiu kiu glavon prenas, per glavo pereos" – "Ne mortigu" ktp. Sed la religio ne donas iun pruvon pri la scienceco de siaj postuloj. Ĝi postulas blindajn obeon kaj

kredon, kaj por siaj postuloj ĝi ne donas motivojn esploreblajn per la inteligento. Senrezerve ĝi postulas esti plej alta aŭtoritato en tiuj aferoj, kaj per la vortoj "La vojoj de Dio estas ne esploreblaj" ĝi rifuzas ĉian intelektan intervenon.

**12. La pensanta homo ne plu kapablas klini sin antaŭ spirita diktaturo**

La pensanta homo postulas rajton memstare taksi ĉion kio ĝi travivas. Ĝi deziras uzi la spertojn kiujn ĝi akiris per la materia scienco kaj tiel ne plu kapablas klini sin antaŭ spirita diktaturo. Se prezentiĝas al ĝi aserto, ĝi postulas ĝin prilumita kaj konfirmita ne nur por la sento sed ankaŭ por la inteligento. Kaj ĝuste rilate al tiu postulo la koncernaj religioj en la mondo malsukcesas. Ĉar same kiel ili estis bonega nutraĵo por la sento, tiel same ili estas maleblaj por la inteligento. La religioj ne estas kreitaj por homoj kiuj postulas konkretajn faktojn. Ke tiel estas, montriĝas klare se ekzemple ni provas observi la kristanismon en lumo de la inteligento. Kio estas la kerno en la kristanismo? Sendube ĝi konsistas el la instruoj kiujn Kristo mem donis al la homoj. Ĉu ne ni lernis ĝuste tion, ke Kristo diris en situacio kie unu el liaj disĉiploj tiris sian glavon kontraŭ la asistantoj de la ĉefpastro: "Remetu vian glavon en ĝian ingon, ĉar tiu kiu glavon prenas, per glavo pereos!" Krome ni lernis "Al tiu, kiu batas vian dekstran vangon, turnu ankaŭ la alian!" Kaj sur la kruco li diris: "Patro, pardonu al ili, ĉar ili ne scias kion ili faras!" Kaj fine li predikas, ke "Oni amu Dion super ĉiuj aferoj, kaj sian proksimulon kiel sin mem!"

**13. Nuntempe sur multaj kampoj la kristanismo estas miksita kun paganeco**

Ĉu iuj povas kontesti ke tiuj puraj vortoj de Kristo estas la plej interna kerno de la kristanismo? Certe ne! Sed en tiuj vortoj ne troviĝas ia ajn defendo por milito. Tie absolute ĉia milito estas anatemita. Tamen la kristanaj ŝtatoj estas la plej militemaj. En ili "la milit-scienco" atingis la plej altajn nivelojn, ja en ili ni nuntempe trovas la plej terurajn mortigilojn iam kreitajn, nome la atoman kaj hidrogenan bombojn kaj verŝajne ankaŭ baldaŭ la ĉiodetruan, kobaltan bombon. La kristanaj homoj fariĝis la plej grandaj mortigantoj de la tero kaj kapablas en la daŭro de momentoj ekstermi milionurbojn kaj krom tio ĉion vivan en distanco de miloj da kilometroj. Ĉu ne la mortigokapablo de la homo estas milfojojn pli granda ol tiu de la tigro? Kiam tamen en la pastraro de la kristana eklezio oni benas la armilojn kaj petas la ĉielon helpi armeojn por venki, do la kaŭzo de tio necese estas ke pro la formo laŭ kiu la kristanismo estas instruata en lernejoj kaj instruejoj, ĝi ankoraŭ ne ekzistas en tiu pura formo kiu estas esprimata en la antaŭe cititaj instruoj kaj kiun plenumis ĝia origino. Ĉio miksita en ĝin, kio havas tendencojn beni kaj idealigi perforton, necese estas kontraŭa al la klaraj instruoj de Kristo. Milito, mortigo kaj subpremo de homoj estas malo al tiu kristanismo kiun Jesuo mem instruis. Sed malo al la vera kristanismo povas esti nur ne-kristanismo aŭ antikristo, kiu plue estas la samo kiel paganeco. La mondo do ne estas regata de vera kristanismo, sed male grandskale de kristanismo, kiu sur multaj kampoj estas miksita kun paganeco. Ke ankaŭ la kristana dikoncepto ne estas kristana laŭ pura formo, tio ne plibonigas la aferon. Tie oni lernas pri dio, kiu kaj koleriĝas, kaj punas kaj venĝas. Oni lernas ke dio favoras iujn homojn, savas ilin kaj lasas ilin veni en sian ĉielon, dum aliaj ekhavas mizeran vivon en eterna fajro. Oni predikas eternan inferon por ĉiuj kiuj ne kredas je tiu dio,

samtempe kun tio ke oni instruas ke li kreas ĉiujn vivajn estulojn. Oni klarigas ke li estas ĉiopotenca kaj ĉioscia. Sed se li estas tia, li necese anticipe scias, ke tiu aŭ alia homo sekvos vojon al eterna perdiĝo, al eterna infero. Kial li kreas tiujn estulojn? Sed kial li ne kreas ĉiujn tiamaniere, ke ĉiu unuopa estulo finfine venos en lian helan ĉielon? Ja krome oni asertas, ke la tre plej granda parto "iras al infero", dum nur la eta grupo estos savita. Sed se ne anticipe Dio scias kiu iros al la infero kaj kiu iros al la ĉielo, tiam li ne estas ĉioscia. Kaj se li anticipe scias kaj ne povas malhelpi tion, tiam li ne estas ĉiopotenca. Kaj se li kapablas savi tiujn estulojn de la terura sufero de la infero, sed ne faras tion, tiam li ne estas ĉioama. Por kiu utilo estas cetere tiu eterna infero, kiam neniu povas elveni de ĝi? Kiam Dio tamen kreas la plej grandan parton de la homaro tia, ke neeviteble ĝi venos tien kaj ke sekve ne povas ekzisti alia celo por tiuj estuloj, do ja necese estas agrable por li vidi ilin esti suferigataj. Se tiel estas, tiam li estas ne nur ne ĉioama, tiam li estas ankaŭ vere perversa, vere sadisma.

**14. La homoj nek komprenas nek vivas laŭ la pura instruo de Kristo**

Ja tia fakte estas la konsekvenco de la pure inteligenteca klarigo pri tiuj informoj, kiujn la aŭtoritata kristanismo donis al ni. Ne estas strange, ke tia groteska, tia sadisma dibildo ne daŭre povas esti la spirita fundamento por la moralo kaj konduto de la homoj. Ankaŭ ne estas strange, ke necese naskiĝu homo en karno kaj sango, kiu povis montri al la homoj menson kaj konduton, kiu rilate al amo multege superbrilas la paganan dibildon. Tiu homo estis la mondliberiganto Jesuo Kristo.

Estas tute nature, ke la pura instruo de Kristo ne povis dum jarmiloj esti miksita kun la pagana atmosfero sen esti malbonigita, sen esti deformita favore al la paganeco. Kaj kiel mi jam informis, liaj puraj kaj amaj instruoj fariĝis nur rezultoj, kiujn oni ja predikas de centmiloj da podioj en la mondo, sed kiujn oni tute ne komprenas kaj ankaŭ ne obeas. Kvankam tiu bildo de Dio kiun Kristo donis al ni, multe superbrilas la dibildon de la Malnova Testamento, la rezulto tamen ne tiom fariĝis tio, ke oni sekvis lian ekzemplon, kiel tio ke oni konceptis Kriston kiel estulo kiu devis mildigi la koleron de Dio al la homoj per tio, ke li prenis sur sin la punon por tiuj pekoj kiujn ili faris.

Sed ĉu tio estas honoriga por Dio? Se li povis pardoni al la homoj, tiam estas ja strange, ke por liberigi la aliajn el la eterna perdiĝo li lasis senkulpan homon kiel Jesuo krucumiĝi por liberigi la aliajn el la eterna perdiĝo. Multe pli tia sinteno kaj agmaniero pensigas pri perverso ol pri ĉioamo. Ne, ĉiuj tiuj imagoj multe tro klare montras nelogikan, homan pensadon. Tio estas dio kreita laŭ la bildo de la homo kaj kun homaj difektoj aŭ neperfektecoj. La neperfekteco aŭ paganeco de la Malnova Testamento vastiĝis profunde en la rakontojn de la Nova Testamento aŭ baza libro de la kristanismo.

**15. Meze en la plej profunda mallumo proklamiĝas la naskiĝo de nova epoko**

Estas ja vere kompreneble, ja eĉ rekte memkompreneble, ke tia dibildo ne dum ĉiuj tempoj povas esti la spirita vivfundamento por la homaro, sed ke necese venas tempo en kiu okazas ŝanĝiĝo. La unua efiko de tiu ŝanĝiĝo estas la granda elmembriĝo kiun spertas la mondreligioj sur la tuta tero. Ĉie kie la materia scienco influas en edukado kaj lerneja instruado, tie degeneras la kredo je la malnova dikoncepto kaj la kun ĝi kunligita religia kulto. La

materiisma sendieco estiĝas, kaj oni komencas kredi je la ludo de hazardoj kaj je la senviveco de la naturo, malgraŭ la grandega, logika kreado, kiun oni vidas en nia propra organismo kaj ekster ĝi en la proksima kaj en la plej malproksima partoj de nia senshorizonto.

Por la moderna homo la vivo reduktiĝis al treege konkreta kono pri la materio kaj ĝiaj fortoj, samtempe kun tio ke preskaŭ komplete ĝi perdis la kontakton kun la psika flanko de la vivo aŭ kun tiu flanko kiu efektive esprimas aŭ estas la vivo mem. La sentema, religia mondo vivas en la kredo je mankhava dio, kaj la materia aŭ fizike-materia mondo vivas en la kredo je sendieco, je hazardo aŭ kaoso. Ambaŭ konceptoj malkaŝas efektive grandegan superstiĉon. Sed nenio povas daŭre ekzisti surbaze de superstiĉo, kaj malgraŭ tio ke la nuntempa mondkulturo kreis tiom da geniaj mirindaĵoj, ĝi estas malgraŭ sia tuta genieco mondo en disfalo. La moderna homo senestas veran, spiritan vivfundamenton. Ĝi estas estulo meze inter du grandiozaj vivepokoj, sed tion ĝi ne scias. Nuntempe ĝi pli kredas je la morto ol je la vivo. Tute reale ĝi spertas pereon de grandega, spirita mondo, sed tiuj kiuj vere havas “okulojn per kiuj vidi” kaj “orelojn per kiuj aŭdi” antaŭ longe “vidis” la unuajn vibrantajn radiojn de nova, kosma sunleviĝo super la mondon kaj antaŭ longe “aŭdis” la sonon de tiu muziko de la sferoj, kiu ĉiam en la plej profunda mallumo proklamas la naskiĝon de nova epoko. Ĝi estas epoko en kiu la sola, vera Dio de la vivo denove estos la centra afero en ĉia pensado, kaj kie la proksimula amo elpurigita de ĉia besta skorio lumas de poluso al poluso.

El prelego de Martinus en Studenterforeningen, Kopenhago, la 17-an de septembro 1948. La manuskripto estas prilaborita de Erik Gerner Larsson. La prilaboro estas aprobita de Martinus. Unuan fojon en Kontakt-letero n-ro 25-26, 1956. Artikolo n-ro: M2540. Traduko Ib Schleicher



*Martinus prelegas en la prelegejo de Martinus-Instituto, Kopenhago*



# Martinus kaj Kriŝnamurti 3

## Pri la venonta mond-instruisto, parto 3 el 3

de Ole Therkelsen

**15. La metodo de Kriŝnamurti kaj la mondbildo de Martinus**
Kriŝnamurti en siaj libroj donis multajn inspirajn konsilojn kaj indikojn pri la ĝusta maniero vivi aŭ pensi, sed ne havante kosman konscion, li ne povis solvi la vivmisteron tiel kiel povis Martinus. Kriŝnamurti tute simple ne havis la kvalifikojn necesajn por fariĝi mondosavanto kaj krei la novan spiritan sciencon aŭ la eternan mondbildon, postulatajn por tiu mondliberigo de la dudeka jarcento, kiu servu kiel nenio malpli grava ol kultura fundamento de la estontaj jarmiloj.

La Kriŝnamurti-a metodo de memstara pensado kaj kompreno estas tute kongrua kun la nova mondimpulso, kaj ĝuste tiun metodon oni kiel vera spirita sciencisto devas uzi, kiam oni volas alproprigi al si la komprenon de la Spirita Scienco de Martinus. – Martinus neniel deziras ke oni kredu lin, male li emfazas ke gravegas ke la unuopa spirita esploranto interesita pri liaj analizoj zorge studu kaj elprovadu lian vivoverkon.

*Livets Bog* al la spirita sciencisto estas manlibro por observi la vivon, same kiel manlibro pri flaŭro estas manlibro por observi plantojn. *Livets Bog* estas helpilo por kompreni la rektan parolon de la vivo aŭ la *libron de la vivo* de la ekzistado mem. Martinus ne estas aŭtoritato kiun oni devas fidi, sed konsilisto kiu montras kie kaj kiel oni mem povas fari siajn observojn de la leĝoj de la vivo. Ke li skribis tiun serion da kosmaj analizoj kiuj kune formas la bazajn analizojn de la universo, ne estas nur por ke oni studu ilin. La intenco fare de Martinus estas instigi la leganton mem eltrovi ĉu tio kion li skribas ankaŭ efektive estas io observebla. Niaj propraj travivaĵoj kaj observoj montru la validecon de la verko de Martinus – *La Eterna Mondbildo*.

Martinus klarigas kiel la homoj iom post iom liberigos sin el la obsedo pri la pensoj de aliaj kaj el religia sugestio:

“Ĉiuj ĉi formoj de sugestio kaj ‘obsedo’, same kiel la variaĵoj kiuj aperas inter la unuopaj estuloj, nepre pluekzistos dum ankoraŭ ne finevoluos la kapablo de la homaro kaj de la unuopaj homoj sperti la veron aŭ la vivleĝojn. La plua evoluo de la unuopaj homoj konsistos el tio ke ili grade liberigos sin el tiuj sugestioj kaj ĉiam pli konstruados sian psikon aŭ konscion surbaze de sperto, scio kaj propra travivado. Por tio oni bezonas novan sciencon, sciencon pri la spirita realeco de la universo, mondbildon kiu montras la dependon kaj signifon de la unuopaj lokaj detaloj al la tuto. Kompreneble estos homoj kiuj kredos ĉi tiun spiritan sciencon kaj faros el ĝi novan religion, sed tio montras ke ili ne havis la kapablon kompreni ĝin.” (*Kosmos* n-ro 10/1990).

**16. Kio poste okazis al Annie Besant?**
Laŭ Martinus la mondliberigo ne tiel funkcias ke la nova mondliberiganto

anticipe estos prezentata per grandaj fanfaroj. Male, la mondliberigonto kviete kaj nerimarkite envenos sur la scenejon de la vivo, kaj ne estos anticipe nomumita kaj aklamita de memelektitaj disĉiploj. – Jesuo estis modeste naskita en stalo kaj havis nerimarkatajn kreskon kaj junaĝon.

Vizitante en 1954 Baraton, Martinus havis la okazon vidi la ĉambron de Annie Besant. Ĝi estis sufiĉe malgranda kaj simpla. Apude estis grandega ĉambro, kiu siatempe apartenis al Kriŝnamurti. Ĝi estis malplena, enestis nur giganta bildo de li vestita per impona hinda kostumo. – Certe, Annie Besant treege amis Kriŝnamurti-n.

Ĝis 1929 ŝi dudek jarojn dediĉis al Kriŝnamurti, do estis forta bato al la 82-jara Annie Besant travivi ke Kriŝnamurti montriĝis ne esti la estonta nova mond-instruisto. Ŝiaj vizioj kaj revelacioj montriĝis falsaj, kaj sekve ŝi psike tute detruiĝis kaj kvazaŭ mensmalsaniĝis.

Ĉe miloj da adeptoj Besant perdis tiujn fidon kaj kredon, kiujn ili havis al ŝi kaj ŝiaj revelacioj. Multaj antaŭe opiniis ŝin kvazaŭ neeraripova kaj staranta sursojle de dieco. Ŝi mortis kvar jarojn poste en 1933.

**17. La agnosko de la ĉefsimbolo fare de la spiritaj majstroj**

Tri jarojn post sia akiro de kosma konscio, Martinus estis alpropriginta al si plenan superrigardon de la tuta mondbildo kun ĉiuj ĝiaj energioj kaj principoj. Poste en 1927 Martinus finfaris la tiel nomatan "Ĉefsimbolon", La eterna



***Lars Nibelvang ĉe sia skribotablo.*** *Sur la muro estis bildoj de la spiritaj majstroj interalie El Morya kaj Kuthumi*

mondbildo. (La Eterna Mondbildo, vol. 1, simbolo n-ro 11). [Vidu eo-*Kosmos* n-ro 1, 2018].

Martinus rakontas jene: “Unu el la simboloj kiuj plej cerbumigis min, estis la ĉefsimbolo. Mi devis fari ne malmultajn projektojn kaj skizojn, antaŭ ol ĉiuj detaloj estis en ordo. Iun tagon kiam mi staris ĉe mia desegnotablo finpolurante ĉi tiun simbolon, mi ekkomprenis ke mi ne estas sola. Ambaŭflanke de mi staris blanke vestita figuro, po unu “spirita majstro”. Tute silentaj kaj pasivaj ili dum tempeto staris kun brakoj krucitaj, rigardante la simbolon. Tiam ili kapsalutis kaj malaperis. Sed de tiu tago mi sentis ke mi havas la simpation kaj subtenon de la tuta spirita mondo.” (*Memoroj de Martinus*, paĝo 82, Zinglersens Forlag 1987).

Ne rekte de Martinus mem, sed de intima kunlaborinto troviĝas informo ke Martinus per bildoj en la loĝoĉambro de Lars Nibelvang ekkonis la aspekton de iuj el la spiritaj majstroj, interalie El Morya kaj Kuthumi. Martinus laŭdire rekonis kelkajn el tiuj spiritaj majstroj, kiam ĉe sia desegnotablo li sentis ilian agnoskon de la finpretigo de la ĉefsimbolo en 1927. Parto de tiuj bildoj de spiritaj majstroj estas videbla en la foto de Nibelvang sidanta en sia loĝoĉambro.

Alia amiko, Per Thorell (1916-2003), notis en sia taglibro ke Martinus rakontis ke la “Majstroj” priparolitaj ĉe la teozofoj ne nepre estis plene inicitaj. La majstro Kuthumi laŭdire interesite sekvis la laboron de Martinus pri la solvo de la vivmistero. Tio estis tamen nur pro intereso, ne pro helpemo nek pro ĵaluzo. Tion sciis Martinus, ĉar plurokaze laborante ĉe la tajpilo li sentis la ĉeeston de Kuthumi kaj vidis lian observantan vizaĝon malantaŭ sia ŝultro.



***Martinus ĉe la desegnotablo en 1965.*** *La kosma spirala ciklo 2 – la nefinita homo. La Eterna Mondbildo 5, simbolo n-ro 76. Fotis Arne Henriksson*

## 18. La kontakto al la saĝuloj de la Oriento

Alf Lundbeck en sia taglibro donas kelkajn informojn pri la kontakto de Martinus al la mahatmoj de la Oriento. Martinus rakontis al li ke la saĝuloj de Tibeto estas iaj gardantoj de la terhomoj. Per siaj potencaj psikaj fortoj ili povas faradi aferojn al kiuj ordinaraj homoj sin tenas tute senkomprene. Ekzemple estus al ili facila afero demateriigi libron el unu el la Okcidentaj bibliotekoj kaj rematerigi ĝin en Tibeto kaj tiamaniere studi kion ajn ili volus. Same, se iu el iliaj disĉiploj montriĝus nedezirinda, ili facile povus neniigi el lia memoro ĉion kion ili instruis al li. Foje, kiam unu el la mahatmoj vojaĝadis tra Usono kaj estis ironta al Ĉikago, li tamen devis reiri ĉar ĉirkaŭ la urbo regis terura mortiga atmosfero, devenanta de la kolose grandaj porkobuĉejoj. Maleblis al li iri pli proksimen. Tiom sentemaj estas iliaj spiritaj korpoj.

Helena Blavatsky (1831-1891) studis ĉe tiuj mahatmoj dum sep jaroj kaj poste estis taskita disvastigi la teozofian instruon en la Okcidento.

Komence, dum la jaroj 1921-1928, al ĉi tiuj mahatmoj ne estis tute klare ĉu la scio de Martinus estas bona aŭ malbona, damaĝa aŭ utila. Tio eble povas ŝajni stranga, sed estis tiel ke multaj el la novaj temoj kiujn Martinus proponadis, al ili kaj al la malnova mondo ŝajnis malmoraleco, dum Martinus karakterizis ilin kiel moralajn. Tial ili provizore tenis sin hezite, dum ili daŭre prizorgis ke la instruo de Martinus estu malhelpata disvastiĝi al pli vasta rondo.


Nur en 1928 iĝis al ili tute klare ke la instruo de Martinus estas utila al la homoj. Tiam ili tute turniĝis. – Martinus rakontis ke tiam estis granda faciligo al li, ke tute malaperis la premo kiun ili faradis. Samtempe malaperis ankaŭ liaj ekonomiaj malfacilaĵoj, ĉar Alf Lundbeck kaj lia familio ekhelpis lin. La mahatmoj restis en seninterrompa kontakto kun Martinus kaj nun estis liaj lernantoj. Laŭ la eldiro de Martinus oni ne povas diri ke la mahatmoj plene apartenas al la sama evolu-linio kiel la ceteraj terhomoj. Ilia evoluo, en kiu precipe la psika inteligento ludas gravan rolon, kvazaŭ renkontis la homan evoluon en intersekciĝo. Iuj el ili laŭdire aĝas 150 jarojn, kaj tio ankaŭ estas pensebla, laŭ Martinus, ĉar per siaj psikaj fortoj ili kapablas, laŭbezone, konservi la vivodaŭron de siaj fizikaj korpoj longe trans la normalon.

Eble estas ne hazarde ke kiam en 1928 la mahatmoj fine ekagnoskis la laboron de Martinus, komencis aperi rompo inter Kriŝnamurti kaj la teozofoj. Mia propra spekulativo estas ke la mahatmoj subtenadis la "Orientan Stelon" nur ĝis 1928, post kio la ordeno dissolviĝis. Laŭ la priskribo de la alta spirita intenseco en la fonda kunveno de la "Orienta Stelo" en 1911 [par. 2.3], oni ja povus supozi ke la ordeno je tiu momento ekricevis de la spirita flanko potencan apogon kiu estis tute malaperinta ĉe la dissolviĝo de la ordeno.

Sed ĉio tio tamen povas ŝajni utila kaj eĉ necesa en la tempo antaŭ la alveno de Martinus. La teozofio estis preparinta la grundon en la Okcidento por la kosma scienco, tiel ke la homoj nun ne staras tute senkomprenaj antaŭ demandoj de reenkarniĝo kaj karmo. La teozofio kaj ankaŭ la antropozofio tiamaniere pretigis la vojon plenumante tiel nomatan "Johan-Baptistan laboron" por la kosmaj analizoj de Martinus.

## 19. Ĉu Martinus legis ion de Kriŝnamurti?

C.W. Leadbeater verkis libron kun la anglalingva titolo *Lives of Alcyone* [Vivoj de Alcyone], kiu laŭaserte priskribas aron el la antaŭaj enkarniĝoj de Kriŝnamurti kun rilatoj al pluraj




***Krishnamurti kaj Annie Besant***


konataj teozofoj. La nomo Alcyone estis donita al Kriŝnamurti, kiam li 14-jara knabo verkis la libron *Ĉe la piedoj de la Majstro,* eldonita sub la kaŝnomo Alcyone. Leadbeater skribas: "La libro *Ĉe la piedoj de la Majstro* estas al ni la plej bona kaj plej valora libro ĉi-momente. Tiu libro reprezentas pli specife la Instruon de la Mondinstruisto, la Venonto, Lordo Majtrejo, la Bodhisatvo."

La titolo de la libro *Ĉe la piedoj de la Majstro* estas elektita de Annie Besant inter 30-40 alternativoj. En la antaŭparolo de la libro ŝi skribas: "La instruoj enhavataj en ĝi estis komunikitaj al Alcyone (Kriŝnamurti) de lia Majstro Koot Hoomi (Kuthumi), kiam Tiu preparis lin por inico". […] "Ĉi tiuj vortoj ne estas miaj, sed de la Majstro."

En la antaŭparolo Alcyone mem skribas: "Ĉi tiuj vortoj ne estas miaj, sed de la Majstro kiu min instruis. Sen li mi nenion sukcesus plenumi; per lia helpo mi metis miajn piedojn sur la vojon."

Annie Besant diras ke la pliparto de la libro estas ripeto de la propraj vortoj de la Majstro de Kriŝnamurti, kaj kio krome troviĝas kaj ne estas precize la propraj vortoj de la Majstro, estas la penso de la Majstro esprimita per la vortoj de Kriŝnamurti mem.

Por misfamigi la tutan aferon, iuj asertis ke al tiu dekkvarjara knabo ne eblus skribi la libron mem. Tial Leadbeater volis atesti pri la maniero kiel ekestis la libro. (*Prelego III*, 22. dec.1914). C. W. Leadbeater faris en-



***Kriŝnamurti, Leadbeater kaj Annie Besant***

tute 32 prelegojn dum 1914-1915 kaj eldonis ilin kiel libron kun la titolo *Talks on "At the Feet of the Master"* [Paroladoj pri "Ĉe la piedoj de la Majstro"] en 1922. (Dana traduko de Frants Lexow eldonita de Teosofisk Samfund en 1924).

En siaj prelegoj Leadbeater informas ke kaj li mem kaj Annie Besant vidis la skribkajerojn kaj paperpecojn sur kiujn Kriŝnamurti ĉiumatene skribadis kelkajn frazojn. Pli ol kvin monatojn post kiam tiu teksto estis skribata matenon post mateno, la libro estis eldonita.

Leadbeater klarigas kiamaniere okazis kiam la libro estis skribata: "Ĉiunokte mi devis venigi tiun knabon en lia astra korpo al la domo de la Majstro, por ke instruo povu esti donata al li. La Majstro pasigis eble dek kvin minutojn ĉiunokte parolante al li; sed fine de ĉiu parolado li ĉiam resumis la ĉefpunktojn de siaj diritaĵoj en unu frazo, eble kelkaj, kaj faris ĝin malgranda eltiraĵo kaj notis ĝin. La libro *Ĉe la piedoj de la Majstro* konsistas el tiuj frazoj, eltiritaj el la instruo de la Majstro, faritaj de la Majstro mem kaj per liaj propraj vortoj."

La knabo skribadis la frazojn kun ne malmulte da peno, ĉar lia scio de la angla ne estis tre bona. Li notis ilin en lerneja skribkajero, plej ofte per krajono, kelkfoje per plumo, kaj kelkfoje sur unuopaj paperpecoj. Poste ĉiuj tiuj notoj estis ordigitaj kaj tajpitaj de Leadbeater. Laŭ Leadbeater la teksto estis agnoskita de la Majstroj de la knabo Koot Hoomi kaj la mond-instruisto mem, Lordo Majtrejo.

La interesa demando do estas, ĉu tiu libro kiun Martinus legis en februaro-marto de 1921 estis *Ĉe la piedoj de la Majstro*. Sed al la postaj generacioj

daŭre restas neklare kio estis la titolo de la teozofia libro kiu instigis Martinus-on mediti pri Dio. Martinus mem diris ke li ne memoras la titolon, ĉar li tuj post sia iniciĝo reliveris la libron ne finleginte ĝin. Sed laŭ la taglibro de Lars Nibelvang la libro pruntita de Martinus estis ĝuste *Ĉe la piedoj de la mastro*. Tamen en tiu libro ne troviĝas la medit-preskriboj kiujn Martinus menciis.

Sed el la taglibro de Nibelvang evidentiĝas ke li buŝe donis instrukciojn al Martinus kiel mediti, do supozeble Martinus povis kaj legi la libron *Ĉe la piedoj de la Majstro* kaj samtempe teni sin al la buŝaj medit-instrukcioj de Nibelvang. – Oni ja devas memori ke pasis dek jaroj antaŭ ol Martinus komencis skribi pri ĉi tiuj eventoj en *Livets Bog* kaj en *Ĉirkaŭ la naskiĝo de mia misio.*

Post la unua vizito ĉe Nibelvang, laŭ sia propra taglibro Nibelvang donis al Martinus la jenan admonon antaŭ la foriro: “La sola konsilo kiun mi opinias rajte povi doni al vi ĉe la foriro, estas la vortoj de la granda instruisto Bhagavan Ramakriŝna: ‘Fiksu vian penson firme sur Dion, kaj ĉio estos bona al vi!’”

Nibelvang ankaŭ skribis: “Antaŭ ol Martinus forlasis min, mi pruntis al li kelkajn libretojn por kunporti hejmen; mi kredas ke temis pri *Bhagavad Gita* kaj *Ĉe la piedoj de la Majstro*. Kaj tiam mi donis al li instrukcion pri la plej elementaj reguloj de meditado; ĉar mi sentis ke mi staras antaŭ personeco tre progresinta, kiu eble en proksima estonteco atingos ĉion kion mi vane serĉadis dum longaj jaroj.”

Ne estas tute ekskluziveble ke Martinus eventuale legis iom en Bhagavad Gita, aŭ ke Nibelvang transdonis preskribojn el tiu libro. Ekzemple en la 2-a ĉapitro, versoj 60-61 oni legas: “Tiamaniere bridante siajn sensojn, li trankvile sidu turnante la penson al Dio; tiu kiu povas lasi siajn pensojn esti regataj



***Kriŝnamurti kaj aĝiĝinta Annie Besant***

de Dio, estas saĝa.” – En sia meditado Martinus ja direktadis sian konscion al Dio, kaj tiurilate legiĝas krome en la 6-a ĉap., versoj 10-14: “Plena de anima paco, libera el timo, firma en sia decido pri memrezigno, havante la menson trankvila, li pensu pri Mi kaj enprofundiĝu pri Mi sola.” (*Bhagavad Gita*, retraduko el la traduko de V. Jespersen, J.S. Jensens Forlag, 1912).

**20. Martinus vidas Kriŝnamurti-n en la flughaveno de Romo survoje al Japanio kaj Barato en 1954**
Vojaĝante en 1954 al Japanio kaj Barato, Martinus interhaltis en Romo, la urbo eterna, kiu laŭ lia vojaĝpriskribo tiom gravis por la historio de Eŭropo, nelaste ĉar la disĉiploj de Kristo portis kristanismon al la imperiestroj, kiuj kristanigis la Roman imperion, per kio estis kristanigita ankaŭ Eŭropo.

Martinus skribas jene: “Dum la restado en la flughaveno de Romo mi vidis kelkajn baratanojn kiuj interhaltis ĉi tie survoje al Mumbajo en Barato. Kaj jen mi surpriziĝis vidante personon kiun mi dum multaj jaroj konis de bildoj kaj revuoj. Estis la barata saĝulo Kriŝnamurti. Li ne rilatis kun la aliaj barataj pasaĝeroj kaj malkiel ili ne estis vestita en barata kostumo. Li paŝadis tien-reen kvazaŭ malpacience atendante. Mi volonte ekparolus kun li, sed ĉar mi ne havis interpretiston, tio ja estis nefarebla. Sed ĉar li estis survoje al Barato, mi antaŭvidis revidi lin en la teozofia monda ĉefsidejo en Adyar, Ĉenajo, kien mi mem estis invitita por poste prelegi. Intertempe alvenis la tempolimo de nia restado en Romo, kaj ni estis vokitaj reiri en la aviadilon, kiu nelonge poste denove leviĝis kaj ekdirektis sin al nia malproksima celo.” (*Kontakta letero* 1954).

**21. Anna Ørnsholt interpretas plurajn prelegojn por Martinus en Barato**
En decembro 1954 Anna Ørnsholt (1882-1972) akompanis Martinus-on dum lia rondvojaĝo al aro da urboj en Barato, kie li plurfoje prelegis. Ŝi multe utilis al li, ĉar ŝi estis tre bona interpretisto. (*Memoroj de Martinus*, paĝo 136, Zinglersens Forlag).

En 1925 Anna Ørnsholt vojaĝis de Danio al Barato, kie ŝi dum 10 jaroj estis sekretario de la fama sciencisto J.C. Bose (1858-1937) kaj poste dum multaj jaroj ankaŭ al ĉefministro Nehru. – Anna Ørnsholt, kiu en 1954 loĝis preskaŭ 30 jarojn en Barato, ankaŭ angligis kelkajn el la libroj de Martinus, interalie *La Libron de la Vivo 1.* Pere de Anna Ørnsholt la Spirita Scienco de Martinus akiris sian unuan ekradikon en Barato.

Inter aliaj el ŝia vasta konataro menciindas Annie Besant, Kriŝnamurti, Indira Gandhi, Tagore kaj Sunyata. – La dano Alfred Emmanuel Sørensen (1890-1984) laŭ instigo de Tagore translokiĝis en 1930 el Anglio al Barato, kie li sub la nomo Sunyata fariĝis konata saĝulo.

Martinus eldiris prelegon en la monda ĉefsidejo de la teozofoj en Adyar, en ties granda templohalo kun fajnaj marmoraj plankoj, kie la prezidanto de la teozofia societo faris belan enkondukan paroladon dirante: “Ĉi tiu viro havis mirindajn travivaĵojn pri kiuj li ŝatus iom rakonti al ni”.

Anna Ørnholt interpretis same rapide kiel Martinus parolis, kaj per montrobastono ŝi poste indikis la simbolojn. Inter la aŭskultantoj de la prelegoj de Martinus estis pluraj el la teozofiaj gvidantoj kaj multe da maljunaj saĝuloj kun granda barbo kaj turbano. Ili sidis sur la planko ĝis la ekrano, kaj ili neniam antaŭe vidis simbolojn de tiaj aferoj, kaj laŭ Martinus ili ĉiuj estis enorme

interesitaj. Poste ili venis al Martinus kaj premis al li la manon, kion baratanoj ne kutimas fari. Unu el la maljunaj saĝuloj diris al Martinus: “Kiam vivis ‘la granduloj’” – do Helena Blavatsky, Annie Besant kaj Leadbeater – “estis vivo en la teozofio, sed kiam ili mortis, mortis ankaŭ ĝi. Sed nun venas vi kaj donas al ĝi novan vivon.”

**22. La renkontiĝo de Martinus kaj Kriŝnamurti en 1954**

En 1954 Kriŝnamurti daŭre loĝis en Kalifornio, sed ĉiujare je kristnasko li venis al Adyar, tamen ne por viziti la ĉefsidejon de la teozofoj, sed por renkonti siajn proprajn adeptojn en la urbo. Post la rompo en 1929 la aktivadoj de Kriŝnamurti estis tute apartigitaj el la agado de la teozofoj. En Adyar li loĝis en granda palaceto, disponigita de riĉulo por lia aktivado. Martinus volonte parolus kun Kriŝnamurti, kaj ĉar ja konis lin Anna Ørnsholt, la intenco estis ke ŝi aranĝu inter ili renkonton. En ilia rondvojaĝo estis planite ke ili loĝu en lernejo dum vizitus ĝin Kriŝnamurti, sed la tagon antaŭ ol ili alvenis, li jam pluvojaĝis. Sed poste Martinus havis la okazon veni al tiu riĉula palaceto, kie Kriŝnamurti ĉiumatene donis horon por demandoj en la granda salono.

Laŭ buŝa fonto inter la amikoj de Martinus, Martinus ĉeestis la horon de demandoj kvankam li ne komprenis la anglan. Estis amaso da baratanoj sidantaj sur la planko, kaj ili estis penigaj al Kriŝnamurti pro siaj demandoj. Subite Kriŝnamurti laŭdire komencis skoldi la aŭskultantojn, kaj Martinus demandis al Anna Ørnsholt: “Kio okazas?” – *“Jam dudek jarojn mi tion diradis al vi, kaj vi ankoraŭ demandas!”,* Kriŝnamurti skoldis. – “Nu, do ŝajnas ke li ne sufiĉe bone klarigis ĝin,” humure flustris Martinus al Anna. La opinio de Martinus estis ke Kriŝnamurti estas iom nevarma, kaj ke malfortiĝis al li la nervoj pro la influado kaj la tuta psika premo al kiuj li estis submetita.

Post la horo de demandoj ili renkontiĝis kun Kriŝnamurti, kaj li demandis ĉu Martinus ankaŭ volas ion demandi. Ne, Martinus ne havis momente demandon, kaj li sentis ke Kriŝnamurti ne tre volonte parolos kun li. La interparolo do fariĝis tute mallonga. – Kriŝnamurti eble ne sciis ke Martinus estis tiu skribinta al li ke la mondoklerigo eliros el Danio.

**23. La ciklo kompletiĝas**

En la memorlibro legiĝas: “Mi ankaŭ havis la okazon renkonti Kriŝnamurti-n. Li donis demandan lecionon al siaj adeptoj en la granda templohalo. Mi observis kiel li enpaŝis en la salonon kaj kliniĝis antaŭ la ĉeestantaro, interpremante la manplatojn laŭ la barata moro. – Post tio li sidiĝis sur la plankon, kaj komenciĝis la demanda leciono. La ĉeestantoj faradis al li demandojn, kiujn li respondis. – Post la horo de demandoj mi salutis lin, kaj mi eldiris mian admiron ke en 1929 li malpetis ĉian formon de kultado kiel mond-instruisto. – Al tio li mallonge respondis ke tio apartenas al la pasinteco.” (*Memoroj de Martinus*, paĝo 136).

Martinus montras per siaj analizoj kiel ĉio iras cikle. La ciklo, kiun li mem komencis per sia letero al Kriŝnamurti en decembro 1924, li mem havis la okazon kompletigi, renkontante 30 jarojn poste Kriŝnamurti-n en Barato. Al Martinus ebliĝis persone laŭdi lin esprimante sian admiron ke Kriŝnamurti formetis de si la eble tentan aŭ allogan rolon de mondosavanto. Per tio kompletiĝis tiu ciklo.

*Fino de parto 3/3. Pli da informoj en “Martinus kaj la nova monda moralo”, www.oletherkelsen.dk. La libro ekzistas en Esperanto. Tradukis la tekston el la dana Jens Stengaard Larsen.*

# Martinus kaj lia verko



Martinus (1890-1981) naskiĝis en Sindal, urbeto en Norda Jutlando, Danio. Post la infanjara lerneja ĉeesto li perlaboris sian vivrimedon en diversaj simplaj postenoj, ĝis li en 1921 komencis sian spiritsciencan laboron, kies daŭro ampleksis la sekvajn 60 jarojn. Lian spiritan laboron ebligis aktiviga okazaĵo, kiun Martinus mencias en la antaŭparolo de Livets Bog (La libro de la vivo): "[...] en mi estis aktivigitaj tute novaj perceptokapabloj. Tiuj kapabloj ebligis al mi – ne en ekbriloj – sed male *en konstanta maldorma stato de tagokonscio* – vidi malantaŭ la fizika mondo ĉiujn *portantajn spiritajn fortojn, nevideblajn kaŭzojn, eternajn mondleĝojn, bazajn energiojn kaj bazajn principojn.* La mistero de la vivo sekve ne estis mistero por mi."

La ĉefa verko en la verkaro de Martinus estas la sep-voluma *Livets Bog* (La libro de la vivo). *Livets Bog* enhavas kosmajn analizojn, kiuj detale priskribas la eternajn strukturojn, principojn kaj leĝojn de la vivo. Kiel kompletiga aldono al la ĉefverko, Martinus kreis la plurvoluman verkon *La Eterna Mondbildo,* kiu enhavas koncentritajn konkludojn de la analizoj, ilustritajn per simbolbildoj, tiel ke la leganto en facile alirebla formo havu superrigardon pri la kosma strukturo de la universo. Krom tio, li ankaŭ verkis la librojn *Logiko, Sepulto, La intelektigita Kristanismo,* 28 malgrandajn librojn kaj aldone ĉ. 200 artikolojn, el kiuj 45 estas arigitaj libroforme sub la titolo *Artikelsamling 1* (Artikolaro 1). La kompleta verko de Martinus ampleksas milojn da paĝoj kaj portas la superan titolon *La Tria Testamento.*

Estis la deziro de Martinus, ke lia kosmologio ne estu ligita al iu ajn formo de asocio aŭ membriĝo.



# Scienco pri la vivo

Ĉiam kreskanta nombro da homoj sentas bezonon je nova mondkoncepto, kiu povas kontentigi ne nur la postulojn de ilia inteligento sed ankaŭ ilian emon al senco, justeco kaj amo. La kosmologio de Martinus estas verkita por humane interesitaj homoj, kiuj emas evoluigi aman vivsintenon, kaj kiuj deziras logikajn respondojn al la demandoj de la vivo. La kosmologio konsistas el aro da analizoj pri la leĝoj kaj principoj, kiuj koncernas la spiritan flankon de la vivo. Martinus rakontas, ke ne nur troviĝas leĝoj por la fizika materio sed ankaŭ por la spirita materio, aŭ alivorte, por la pensado. Gravas kiel ni pensas kaj agas. Per nia estmaniero ni povas krei aŭ feliĉan aŭ malfeliĉan sorton, depende de niaj scioj kaj nia kapablo vivi kongrue kun la spiritaj naturleĝoj. La tasko de la spirita scienco estas gvidi kaj informi homojn pri la eternaj leĝoj fone de la vivo, tiel ke ni konscie povas evoluigi la humanecon kaj amon al la proksimulo, kiuj estas la antaŭkondiĉoj por krei mondon, kie ni povas vivi en paco kaj harmonio unu kun la alia.

> Kie nescio estas foriga-ta, tie la tiel nomata "malbono" ĉesas ekzisti.
>
> *(Livets Bog, vol. 1, par. 19)*



# La vivo estas eterna

Laŭ Martinus, la morto ne ekzistas, sed estas nur imagita malo al la vivo. La viva parto en ni estas nia eterna konscio, kiu estas nia ĉefa flanko, rilate al kiu, nia fizika flanko estas io duavica kaj portempa. Ĉiuj organismoj funkcias kiel portempaj iloj por eterne evoluantaj konscioj. Kiam la tiel nomata "morto" okazas, ni perdas la ligon al la korpo. Poste ni troviĝas en spirita sfero en ripoza kaj refreŝiga stato kune kun samideaj homoj. Post tio, ni refoje enkarniĝas al nova surtera vivo por ankoraŭ unu periodo da travivaĵoj kaj evoluigo de talentoj en la fizika mondo, kaj tiel plu ripete. La vivo konsistas el evoluaj spiraloj kun grandiozaj fizikaj kaj spiritaj mondoj, kie novaj variaĵoj de vivformoj kaj novaj manieroj krei kaj percepti daŭre manifestiĝas.



# Nia pensmaniero evoluas kaj nobliĝas

Nia hodiaŭa mondo estas stampita de grandaj renversoj kaj multaj suferoj, kiuj ŝajnas esti arbitraj kaj sensencaj. La Kosmologio de Martinus montras, ke ĉiuj formoj de sufero havas pli altan celon kaj estas nur transiraj statoj. Ĉiu surtera vivo, kiom ajn agrabla aŭ malagrabla, aldonas spertojn kaj per tio ĉiam estas aldoninda bono. Nia travivado de suferoj evoluigas nian kompaton kaj amkapablon kaj tio estas nemalhavebla ŝtupo en la plibonigo de la homo survoje al ĉiam pli senmankaj stadioj. La evoluo ĉiam direktiĝas al io pli alta, kaj fine ĝi kondukos nin al ŝtupo, kie nia amkapablo fariĝos organa talento, je tia nivelo, ke ni ne povus elporti fari ion ajn malbonan, kaj kie nia estmaniero nur povos esti ĝojo kaj beno por aliaj estuloj.

> La plej alta dekoracio havebla, estas nia amikeco al la proksimulo.
>
> *(Konsilia renkontiĝo 1974-01-22, Samarbejdsstrukturen (La strukturo de kunlaboro) ĉap. 8.2)*

# La vivo estas justa

Centra principo en la kosmaj analizoj estas la leĝo pri kaŭzo kaj efiko aŭ la karmoleĝo. Martinus klarigas, ke el eterna vidpunkto, ĉiuj travivaĵoj en la vivo estas efikoj de nia propra estmaniero, ĉar ĉia energio moviĝas cikle. Ĉio, kion ni elsendas al niaj ĉirkaŭaĵoj, revenos en la nuna aŭ en iu sekva enkarniĝo. Nenio en la vivo estas arbitra, kaj ĉar la suferoj ne estas puno, sed nur portempa "malagrabla bono", kiu evoluigas kaj plibonigas nian menson, la vivo estas komplete justa kaj ama. Travivaĵoj en formo de agrablo kaj malagrablo kreskigas en ni la kapablon distingi inter bono kaj malbono, tiel ke ni, iom post iom, ekzerce akiras estmanieron, kiu nur semas lumon kaj feliĉon. La karmoleĝo garantias, ke ni povas sperti nur la rezultojn de pensoj kaj agoj kiujn ni antaŭe mem kreis. Tial ni povas, per nia kreskanta ekkompreno pri la vivleĝoj, transformi nian sorton kongrue kun niaj deziroj.

# La seksa transformiĝo

La hodiaŭa mondo estas karakterizita de grandaj ŝanĝoj en la rilatoj inter la seksoj. Novaj formoj de kunvivado defias la idealojn pri geedzeco kaj familio. La tradiciaj roloj de la seksoj rompiĝas tiel en hejmoj kiel en laborejoj.

La kosmaj analizoj klarigas tiujn tendencojn kiel esprimojn de profunda ŝanĝo en la homa naturo, kiu rilatas al nia transformiĝo de besto al homo. Martinus nomas tiun ŝanĝon *la polustransformo*, per kiu ni evoluas survoje al stato en kiu la maskla kaj femala polusoj ene de individuo alvenis al ekvilibro. La polusa transformiĝo ankaŭ antaŭsignas tute novan formon de sekseco, kie la pariĝa instinkto heredita de la bestoregno laŭgrade estas forlasita favore al tenera kaj karesa sekseco. Ni evoluas survoje al tio, kion Martinus nomas "la vera homregno", kie la diferenco inter la seksoj laŭgrade malaperas, kaj la centra fokuso fariĝas "la homo en la homo". Tiuj finevoluintaj homoj kreos kun amo al ĉio viva la plej senmankajn kreaĵojn ene de arto, scienco, kunvivado kaj vivĝojo.

> "Arto" estas la kapablo enkarnigi "altintelektecon" en la materion.
>
> *(Livets Bog, vol. 4, par. 1150)*

# La vera homregno

Martinus konsideras siajn analizojn "defendparolo por la homaro", pro tio, ke ili estas defendo por ĉiuj vivaj estuloj. Neniu povas agi maljuste, ĉar ni nur povas agi laŭ nia aktuala scio. Ĉiuj "malbonaj" agoj fontas el nescio pri iliaj efikoj kaj konsekvencoj. La tasko de la spirita scienco estas gvidi kaj informi homojn pri la eternaj leĝoj kaj inspiri al tio ke ni konscie povu komenci pensi kaj agi kongrue kun la vivleĝoj kies konkludo estas "Amu vian proksimulon kiel vin mem". Per tio, ni povas en kreskanta grado eviti la multajn malfeliĉajn sortojn de la vivo kaj realigi pacan kaj harmonian vivon unu kun la alia. Laŭ Martinus, ni survojas al "vera homregno", kie ĉiuj nacioj unuiĝos kun la komuna celo krei la imageble plej bonajn kondiĉojn por ĉiuj homoj sur nia planedo. En tia socio ne ekzistas militoj kaj malsanoj, nek ĉagrenoj kaj zorgoj, sed nur amo, lumo kaj vivĝojo. Kunlaboro, toleremo, humaneco, belo, scienco, arto kaj kulturo estas naturaj elementoj de la ĉiutaga vivo de la homoj en la venonta internacia mondregno, kies realigo estas la natura politika konsekvenco de la ĉi tie priskribita nehaltigebla evoluo al pli humana pensmaniero, kiu iom post iom atingos ĉiujn naciojn kaj ĉiujn homojn de la tero.



# Amo al ĉio viva

Fundamenta penso ĉe Martinus estas, ke ĉio estas viva. Niaj organoj, ĉeloj, molekuloj kaj tiel plu, estas vivaj estuloj, kiuj havas sian vivspacon ene de nia organismo, same kiel ni vivas en la organismo de la terglobo, kiu siavice estas parto de eĉ pli granda organismo. La universo konsistas el vivaj estuloj en mikrokosmo kaj makrokosmo – organizitaj kiel *vivo ene de vivo*. Martinus klarigas, ke ni havas grandan respondecon trakti nian propran mikrokosmon, en la formo de nia korpo, en ama maniero. Eĉ penso plej eta influas la bonfarton de tiuj niaj "fratoj plej malgrandaj". Ni povas agi kiom ajn ame al homoj kaj bestoj en nia mezkosmo, sed pro nescio samtempe esti tiranoj rilate al la perceptanta, konscia vivo ene de nia propra mikrokosmo. Malsano estas esprimo de longdaŭra efiko de detruaj pensoj, sentoj kaj kutimoj. Malsanoj povas esti tre doloraj, sed ili ĉiam rezultigas pli grandan kompaton kun tiu viva universo, kiun ni konas kiel nian korpon. Aliflanke, vivmaniero bazita je amo al tiuj interne vivantaj estuloj, kreos radiantan sanon tiel por ni mem, kiel por niaj mikroestuloj.

# La viva universo au Dio

La universo konsistas el miriadoj da vivaj estuloj, kiuj kune konsistigas unusolan ĉioampleksan vivan estulon. Martinus klarigas, ke tiu tuteca estulo identas kun Dio. Dio ne estas io ekstera, kaj neniu estulo povas ekzisti ekstere de Dio. Senti sin forlasita de Dio estas por la nuntempa surtera homo stato tute kutima, sed el kosma vidpunkto, ni ĉiuj estas partoj de Dio. Ĉio, kion ni renkontas en la vivo, estas aspektoj de Dio, kaj nia rilato al Dio ne dependas de religioj, sed en kreskanta grado fariĝas persone spertata dialogo. Laŭ la priskribo de Dio, kiun donas Martinus, troviĝas en la spirita mondo estuloj preparitaj por nin helpi tra la suferoj kaj problemoj, kiuj kreiĝas pro nia nescio pri la vivleĝoj. Li emfazas, ke la preĝo en la estonteco fariĝos scienco. La persona dialogo kun Dio, en la formo de ĉiutagaj vivtravivaĵoj, kaj ankaŭ en la formo de interna perpreĝa interparolo, iom post iom transformos nian spertadon de la ĉiutaga vivo al sencohava ama dialogo, kaj eduka kaj distra.

INFORMO PRI
LA TRIA TESTAMENTO

La celo de la revuo Kosmos estas doni enrigardon en tiun mondbildon, kiun la verkisto Martinus (1890-1981) priskribis en vico da libroj kun la kumuna titolo: La Tria Testamento. La mondbildo de Martinus estas logika analizo de la spiritaj leĝoj kaj principoj de la vivo. La nova mondbildo estas studebla per la libroj de Martinus, kiuj eldoniĝas de la Martinus-Instituto, kaj per prelegoj, kursoj, studrondoj kaj informoj en la interreto. Okazas aktivecoj en la Martinus-Instituto en Kopenhago, en la Martinus-Centro en Klint ĉe Nykøbing Sjælland, en aliaj lokoj en Danio kaj eksterlande. Pliajn informojn oni ricevas kontaktante la Martinus-Instituton. La disvastiĝo de la konoj pri La Tria Testamento okazas sen ia formo de membreco aŭ kreado de asocio.

Eldonanto: Martinus-Instituto
Mariendalsvej 94-96
DK-2000 Kopenhago
Tel: (+45) 3838 0100
Telefontempo: lundo-ĵaŭdo 9-12
DK p.ĝiro 642-9580
www.martinus.dk
esperanto@martinus.dk
shop.martinus.dk

Redakcio: Ole Therkelsen.
Kompostado: Jan Tarbensen.
La frontpaĝa bildo: © Martinus Institut

Kopirajto: © Martinus Institut
Redono de teksto nur laŭ skriba permeso.
Presita de Martinus Institut
ISSN 1600 4116.

# Martinus-Instituto

Martinus-Instituto situas en Kopenhago, Danio, kaj estas sociutila institucio, taskigita de Martinus konservi, eldoni kaj traduki lian verkaron, *La Tria Testamento*. La Instituto ankaŭ devas informi pri la verkaro kaj instrui pri la kosmaj analizoj.



Martinus-Instituto entenas administradon, librovendadon kaj eldonejon, kiu krom la verkoj de Martinus ankaŭ eldonas la revuon *Kosmos* en pluraj lingvoj. Dum la vintra duonjaro organiziĝas studrondoj kaj prelegoj. La Instituto prizorgas la instruadon kaj en Kopenhago kaj en Martinus-Centro ĉe Klint, Danio.

# Martinus-Centro, Klint

Martinus-Centro en Klint en norda Selando, Danio (ĉ. 60 km nordokcidente de Kopenhago), estas internacia studcentro, kie eblas studi la Kosmologion de Martinus per prelegoj, kursoj kaj studgrupoj. Somere okazas ĉiutaga instruado en la dana kaj la sveda kun nova temo ĉiusemajne, kaj en certaj semajnoj ankaŭ estas instruado en la angla, la germana kaj Esperanto. (Petoj pri instruado ankaŭ en aliaj lingvoj estas bonvenaj.) Printempe kaj aŭtune estas kursoj kun varia daŭro, kiuj donas eblecon profundiĝi en la analizojn de Martinus.




# La retejo de la Instituto

Martinus-Instituto havas plurlingvan retpaĝaron, kun ampleksa informo pri la mondbildo de Martinus, la literaturo kaj la simboloj, kursoj kaj prelegoj, la revuo *Kosmos* kaj informo pri la aktivecoj en la Instituto kaj la Centro en Klint. La paĝaro ankaŭ havas serĉilon, per kiu eblas legi kaj serĉi en la verkaro de Martinus kaj en malnovaj numeroj de la revuo *Kosmos*. Interesitoj povas pere de la paĝaro teni sin orientitaj pri aranĝoj, aktualaj eldonoj, kursoj kaj prelegoj.

Provnumeroj de *Kosmos*, informbroŝuroj, listo de literaturo, artikola kajero, instruprogramoj k.s. mendeblas ĉe la Instituto.


## Martinus-Instituto

Mariendalsvej 94-96 · DK-2000 Frederiksberg
Telefono: +45 38 38 01 00 · Retpoŝto: info@martinus.dk
Retejo: martinus.dk · Enreta librovendejo: shop.martinus.dk